






№ 04  
1968

G.L. GHELLI

ITALIA

Organo  
Associazione  
Italiana  
Ferrovieri  
Esperantisti

ferroviista



21-a KONGRESO DE I.F.E.F.

AVIGNON (Francio) de la 17-a ĝis la 23-a de majo 1969  
 U.A.I.C.F./F.F.E.A. F.I.S.A.I.C.

PROVIZORA PROGRAMO

Vendredon la 16-an: Gazetara Konferenco

Sabaton la 17-an: Kunsido de la IFEF-Estraro kun L.K.K.

Interkona vespero

Dimanĉon la 18-an: Diservoj - Solena malfermo de la Kongreso

Distra posttagmezo - Internacia balo

Lundon la 19-an: Komitataj Kunsidoj - Junulara Komisiono

Fakprelega Komisiono - Terminara Komisiono

Duontaga ekskurso per aŭtobuso (Uzès kaj Pont du Gard) - Teatra kaj folkloro vespero

Mardon la 20-an: Komitataj Kunsidoj - Bankedo - Fakprelego kaj filmoj

Merkredon la 21-an: Tuttaga ekskurso per aŭtobuso (Arles kaj Camargue)

Ĵaŭdo la 22-an: Plena Kunsido - Diversaj vizitoj - Junulara vespero

Vendredon la 23-an: Duontaga ekskurso per aŭtobuso (Fontaine de Vaucluse kaj Orange) - Fermo de la Kongreso.

LOKA KONGRESA KOMITATO DE LA 21-a IFEF-KONG.

" MIELA LUNO EN RIMINI "

Estas la titolo de konata Internacia Konkurso por junaj geedzoj starigita de la Sendependa Restadeja Entrepreno de Rimini, kiu donis rajton al la gajnintoj je feliĉa 10 taga restado, tute senpage, en Rimini.

Tiu ĉi jaro, la unuan fojon, al la Konkurso estis malfermita la Esperanta Lingvo kaj la konkurso mem estis publikigita sur la internacia esperanta gazetararo.

Tridek geedzaj paroj sendis iliajn amhistoriojn naskiĝintajn sub la firmamento de la "Verda stelo"; oni elektis inter ili tri parojn: unu ĉeĥoslovaka el Praha, unu aŭstria el Graz kaj unu itala-bulgara (ŝi italino kaj li bulgaro) nun loĝantaj en Conegliano Veneto. Ili kontribuis al bonega propagando inter aliaj geedzaj paroj kiuj gajnis la saman premion de 10 taga restado per aliaj lingvoj.

La nacia gazetararo, aparte la tagĵurnalo "Il Resto del Carlino" kaj la ilustrita semajna revuo "Oggi", kaj la internacia, multe interesiĝis precipe pri la esperantistaj paroj substrekante la solvon de la lingva problemo pere de Esperanto.

La 2-an de junio okazis en Rimini unuagrada ekzameno ĉe Instituto "Maestre Pie". Sukcesis sep kandidatoj, elementaj instruistoj kaj beletra profesorino ĉe loka liceo. La ekzamenkomisiono: S-ino Wanda Sabelli Asquini, Pastro Albino Ciccanti, Rag. Antonio Gambuti. Sekretario p.i. Germano Gimelli.

Post la ekzameno okazis kortuŝa regala renkonto kun la juna geedza paro el Praha, Jaroslava kaj Nikolao NEVAN, gajninta la premion de 10 taga senpaga restado en Rimini laŭ la konkurso "Miela Luno en Rimini", ĝuste de la 25-a de majo ĝis la 5-a de junio. Oni faris al ili multajn demandojn pri la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio kie la esperantistaj fervojistoj kaj ankaŭ gejunuloj estas multnombraj. Oni interŝanĝis donacetojn, invitojn reciproke viziti la du landojn, varmajn salutojn ktp.

" LIBERA TERITORIO DE LA INSULO DE LA ROZOJ "

Eble neniu el vi konas tiun ĉi malgranda Ŝtaton (preskaŭ 400 kvadratoj), tamen por ni Esperantistoj la "Insulo de la Rozoj" reprezentas pli ol simpla geografia aŭ turisma kuriozaĵo; tiu ĉi malgranda Ŝtato, fakte, elektis Esperanton kiel oficialan lingvon, stampas monon kaj eldonas poŝtmarkojn kun Esperanta teksto. Nature, estas Esperante skribitaj ankaŭ la Statuto, la leĝaro k.t.p.

La "Insulo de la Rozoj" estas aparta Ŝtato: ĝi troviĝas 12 km. malproksime de Rimini laŭlonge la mara vojo Rimini-Pola, kaj staras firme ankrita sur ŝtal-betonaj abutmentoj enŝovitaj en la fundo de Adria Maro. Ĝi staras for de Italaj teritoriaj akvoj, pro tio devas esti agnoskata kiel Sendependa Ŝtato.

Tiu ĉi insulo estis projektita kaj konstruita de Bologna inĝeniero Giorgio Rosa kiu konas la spiriton kaj la lingvon Esperanton.

La Bologna Esperanta Grupo, post permeso de la insula registaro, organizos viziton al Rimini kaj ekskurson al "Insulo de la Rozoj" per Boato kiam estos forigitaj la malfacilaĵojn kun la Itala registaro kiu okupigis la insulon per maraj karabineroj, doganistoj kaj policanoj.

Laŭ iniciato de Pastro Albino Ciccanti el Rimini oni celebros Sanktan Meson en Esperanto sur la "Insulo de la Rozoj".

LA VAGONKONSTRUADO EN POPOLA RESPUBLIKO BULGARIO, KELKAJ NOVAJ ŜARĜVAGONOJ KAJ ILIA ELPROVO = RESUMO DE FAKPRELEGO VERKITA DE inĝ.Kiril ERMENKOV, inĝ.Jelio DIMITROV, de la "SCIENCA ESPLORA INSTITUTO PRI TRANSPORTOJ" - SOFIA.

Tradukita de inĝ.Simeon Simeonov kaj Simeon M.Simeonov. Prezentita en la 20-a JUBILEA KONGRESO DE INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO-

-----000000000000-----

La vagonkonstruado en Popola Respubliko Bulgario efektiviĝas en kvar uzinoj en Sofia, Burgas, Drjanovo kaj Ruse. La vagonkonstrua industrio liveras la plejparton de la necesaj novaj vagonoj por modernigi kaj pliampleksigi la vagon-stokon de la Bulgaraj Ŝtataj Fervojoj (B.D.Z.) kaj produktas vagonojn ankaŭ por eksporto.

Lasttempe estis konstruitaj kelkaj novaj ŝarĝvagonoj: kvaraksa netegita aŭtomate malŝarĝebla universala ŝarĝvagono, duaksa UIC-laŭnorma tegita varvagono, kvaraksa cisternvagono, kvaraksa silovagono por cemento. La novaj kvaraksaj vagonoj estas ekipitaj per la nova boĝio BT-4 konstruita laŭ teknika dokumentaro de ORE kaj kapabla veturi kun maksimuma rapideco 100 km/h. Ĉiuj novaj vagonoj estas ekipitaj kun pneŭmatika bremsso KE kaj estas adaptitaj por ricevi estonte la unuecigitan OSShD-U.I.C. aŭtomatan kuplilon.

La novaj vagonkonstruaĵoj estas detale alprovataj por ekkoni la fortecon de ilia strukturo kaj evidentigi iliajn veturkvalitojn. La veturelprovoj kaj statikaj elprovoj estas efektivigataj de scienca centro, kiu disponas pri la necesa specialigita mezura aparataro muntita en laboratori-vagono. La statika ŝarĝigo de la vagonkonstruaĵoj realiĝas sur speciala elprovejo.

La tendenco en la konstruado de novaj vagonoj konsistas el pli racia utiligo de la materialoj pere de pli profunda studo de la konstruaĵoj, enkonduko de vagonoj kun pli granda kargo-kapacito kaj pli efikaj brems-sistemoj, altigo de la maksimuma vetur-rapideco kiu baldaŭ atingos 120 km/h.

La vagonkonstruado en Popola Respubliko Bulgario baziĝas sur modernaj metodoj de projektado, fabrikado kaj elprovado, kio garantias altajn teknik-ekspluatajn kvalitojn de la konstruitaj vagonoj.

#### NEKROLOGO

La 21-an de junio, forpasis la hungara kolego kaj amiko Simono CSÓRA, estinta redaktoro de "Hungara Fervojista Mondo" dum dek jaroj.

Li naskiĝis la 18-an de novembro 1904-a en urbo Zalatna kaj vizitis gimnazion en urbo Gyulaféhvár. Li konatiĝis kun Esperanto en la jaro 1922-a: fariĝis ĝia adepto kaj laboris en Hago ĉe la E-Instituto dum jaroj kaj en 1947-a li fariĝis fervojisto.

En 1962-a ricevis la distingon de meritplena fervojisto; gvidis kursojn por komencantoj kaj progresantoj, estis sekretario de Fervojista Fakso de Hungara Esperanto-Asocio, redaktis la fervojistan revuon "Hungara Fervojista Mondo" dum 10 jaroj. Li estis konata ankaŭ en eksterlando, kiel lerta instruisto Ĉehmetoda, elstara organizanto de la 14-a IFEF-

Kongreso en Budapeŝto kaj lerta laboranto de la 51-a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto.

Ni ĉiam memoras lian simpatian figuron kiu helpis nin dum la memoriginda 14-a IFEF-Kongreso en Budapeŝto, per laŭtparolilo. Pro tio helpa sindonemo ni vokis lin afable "Sinjoro Mikrofono".

Ĝis la morto li estis komitatano de Hungara Esperanto-Asocio.

Ni sendas sincerajn kondolencojn al la ploranta familio kaj al la Hungaraj kolegoj. Ke li ripozu en Paco!

N I L E G I S  
=====

KROMĚŘIŽ - Ĉeĥoslovakio: Belega faldfolio kun fotoj, esperantlingve skribita kiu invitas viziti tiun urbon riĉan de kultura tradicio, de valoraj arkitekturaĵoj, ĝardenoj kaj lernejoj, delonge nomata "Ateno de Hanà". Hanà estas fekunda ebena en mezo de Moravio; ĝiaj loĝantoj estis nomataj hanakoj. La gvidfolio eldonis Distrikta komisiono por turismo en KromĚříž. Turnu vin al Sandi Čap, Husovo nàm 230/15 KROMĚŘIŽ

KARVINA' - Ĉeĥoslovakio: Tiun ĉi jaron la industria urbo Karvinà festas 700 jarojn de sia skribita historio. Je tiu ĉi okazo estis eldonita kelklingva propaganda faldfolio. La lokaj esperantistoj sukcesis atingi, ke estu unu el la uzitaj lingvoj ankaŭ Esperanto. Karvinà estas distrikta urbo situanta 20 km. oriente de la regiona urbo Ostrava.

Se vi havus intereson pri tiuj faldfolioj, bonvolu skribi al: Rondeto de Internacia Amikeco ĉe Strĕdni průmyslovà škola, KARVINA'.

ITALMODEL-Ferrovie: Via Caffaro, 19 - 16124 GENOVA. Dumonata revuo por la entuziasmoj de fervojoj normalaj kaj miniaturaj. La numero de Marto-Aprilo 1968-a enhavas artikolon: "L'Esperanto en la Ŝtataj Fervojoj", verkita de nia malnova amiko Prof-ro Asenzio BLASIMME, emerita alta funkciulo de Italaj Ŝtataj Fervojoj, kiu dum 25 jaroj zorgis la Esperantan elsendon de Radio Roma. La artikolo inter alie substrekas la enkondukon de Esperanto-lingvo en la ĝeneralajn avertojn de la Oficialaj kaj Ĝeneralaj Horaroj de la Italaj Ŝtataj Fervojoj.

ESPERANTA TURISTO: Esperanta informa bulteno por helpi al la turistoj. Eldonas Esperanta Turista Societo en Ljubljana, Ulica Moša Pijade 22, Jugoslavio. Ĝi aperas 4-foje en la jaro. Respondeca redaktoro: Kaplan Martin, Ljubljana, Galjevica 14, Jugoslavio.

DOMANI: Via G.F. Caroto, 12 - 37100 VERONA. Monata revuo pri kulturo kaj aktualaĵoj. Jaro II n-ro 6 junio 1968-a. Enhavas dupaĝan interesan artikolon: "Porhumaneco, unu lingvo. Strukturo, evoluo kaj celo de Esperanto" de Oscar Frusi.

IL FILATELICO: Casella Postale 176 - 95100 CATANIA. Monata revuo pri filatelio. Jaro XVII n-ro 5 Majo 1968-a. Enhavas artikolon: "Esperanto en la filatelio" de nia elstara Samideano Adv.S.J. BOSCARINO.

MONDMAPO: Formato 100x70 cm. Eldonis Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto, Zetska 4/A BEOGRAD (Jugoslavio). Nomigo de landnomoj estas ofte embarasa tasko por esperantistoj. Pro tio estas bonvena kaj gratulinda la iniciato de I.O.E., kiu, kunlabore kun la Internacia Komisiono por ordigo de geografiaj nomoj eldonis ĉi tiun mapon kun pli ol 850 nomoj el fizika kaj politika geografio. Ĝi estas faldebla kaj tre taŭgas ankaŭ por pendigo ĉe muro, ekspozicioj, klubejoj, k.t.p.

=====  
ESPERANTO EN LA HORARO DE ITALA ŜTATA FERVOJO  
=====

Kiel jam anoncote, la diversaj eldonoj de la Oficialaj kaj Ĝeneralaj Horaroj de la Itala Ŝtata Fervojo (F.S.), ekde la 26-a de majo 1968-a, krom la itala, franca kaj germana, enhavas la tekston de la ĝeneralaj avertoj por la uzado de la horarlibro, ankaŭ en hispana kaj Esperanta lingvo je paĝo IV. Koran dankon al Ministro Hon. Scalfaro kaj al Ĝenerala Direkcio de F.S.

53-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO = MADRIDO, 3-10 aŭgusto 1968

KONGRESAJ PREZENTADOJ DE INTERNACIA ARTA TEATRO

La Internacia Arta Teatro, kiu ĉijare festas sian 10-jaran jubileon, prezentos dum la Universala Kongreso en Madrido tre varian programon.

Dum la oficiala Teatra Vespere ĝi ludos jenajn teatraĵojn: Malfacila Elekto (aŭtoro anonima), La Bela Indiferentulo, unuaktaĵo de Jean Cocteau, kaj Suspektinda Persono de Branislav Nuŝiĉ.

Dum la Libervola Teatra Presentado la kongresanoj spektos tri mallongajn teatraĵojn, nome: Servisto Bartolomeo de Ivan Cankov, Homo kun la floro enbuŝe de Luigi Pirandello kaj Maskerado de Miroslav Krleža.

Por la varia distra vespero, plenumota de diversaj grupoj kaj artistoj, I.A.T. preparis i.a. "Maneken-Parado"-n de Marjorie Boulton kaj "Amo en proverboj" de Arturo Azevedo.

ALVOKO AL ĈIUJ ESPERANTISTAJ RADIO-AMATOROJ ITALAJ

Esperantistaj Radio-Amatoroj en Aŭstrujo, Francujo, Finnlando, Pollando, Usono klopodas por starigo de I.L.E.R.A. (Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj), kaj jam regule havas eterkontaktojn en Esperanto. Sendube ne necesas vortoj por konvinki vin, ke la uzado de Esperanto en niaj radiaj renkontiĝoj estas mirinda helpilo por la disvastigo de la movado, kaj samtempe ĝi ebligas interesajn kontaktojn kun eksterlandaj radio-amatoroj pere de komuna lingvo. Kiu deziras kunlabori por starigi italan sektion de ILERA estas petata sin turni al: Radio-amatora Esperanto-Stacio I 1 SKY Andrea TURRISI, Casella Postale n.31 - 17031 ALBENGA (Savona).

NOVAĴOJ DE LA AMIKOJ DE EDMOND PRIVAT

Ĉe Sinjorino Yvonne PRIVAT. Evole 3 - CH-2000 NEUCHÂTEL (Svislando).

La ĉambro Edmond Privat estis oficiale inaŭgurita en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds la 10-an de novembro 1967 en la ĉeesto de la komunumaj kaj kantonaj aŭtoritatoj kaj la rektoro de la Universitato Neuchâtel. La libroj kaj valoregaj dokumentoj donacitaj de sinjorino Yvonne Privat estas en ĝi konservataj. Nun la ĉambro Edmond Privat estas laborloko. Ĝi ne ankoraŭ estas malfermita por la publiko. Oni povas ĝin tamen viziti post rendevua peto.

La publikaĵo REVUE NEUCHÂTELOISE decidis dediĉi specialan kajeron al Edmond Privat. Ĝi enhavos diversajn studojn pri la vivo, verkaro kaj agado de Edmond Privat kaj la tekston de multaj leteroj de personecoj, kun kiuj li rilatis. La amikoj en Eksterlando povas pagi la sumon: 6,50 Sv.Fr. al poŝtpagilo: 20-6841, REVUE NEUCHÂTELOISE, NEUCHÂTEL (Svisio).

ESPERANTO EN LA RADIO

RADIO ROMA - ESPERANTO - Casella Postale 320 I-00100 ROMA (Italio).

La dissendoj okazas de h.21 ĝis h.21,20 (M.E.T.). Ondlongoj: metroj 25,40; 30,90 kaj 41,24. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto", la unua parto al la ĉi-subaj temoj:

AŬGUSTO 1968-a: Dimanĉon la 4-an: La poemo "Al Silvja" de Giacomo Leopardi. 11-an: Canossa, la kastelo de la humiliĝo de Henriko 4-a al Gregoro 7-a. 18-an: La pentraĵoj de Correggio en Parma. 25-an: La etruska urbeto Norchia.

SEPTEMBRO 1968-a: Dimanĉon la 1-an: Tra la literaturo. 8-an: Novaĵoj el Italujo. 15-an: Italaj kanzonoj en Esperanto. 22-an: Leterkesto. 29-an: Kristana mondo.

OKTOBRO 1968-a: Dimanĉon la 6-an: La itala poeto Ugo Foscolo. 13-an: La lago de Idro. 20-an: Tualeto de romaj virinoj. 27-an: La sinagogoj de Venecio

RADIO SOFIA-ESPERANTO-DISAŬDIGOJ. Viale Dragan Zankov, 4 SOFIA.

Programo Printempo/Somero 1968-a. La dissendoj okazas ĉiudimanĉe de h. 21,05 ĝis 21,30 kaj de h.0,30 ĝis 0,55 (nokta lundo) M.E.T. Ondlongoj: metroj 50 (dimanĉe vespere), metroj 31 kaj 49 (lunde frumatene).